# El liberecana vidpunkto

**2**

**2010a setembro**
Gazeto el neantaŭvidebla eldonofteco
Eldonas: Kultura Societo *Interhelpo*
Retpoŝto: interhelpo@gmail.com
Laŭleĝa deponnumero: B-32995-2010


CC BY NC SA

# La anarkiismo (1)

## Kio estas la anarkiismo?*

Tio, karakterizanta la anarkiismon, estas la forrifuzo al la ŝtato. La anarkiistoj asertas, ke povo **super** la socio, sendependa el ĝi, povas esti nur ilo por subpremado. Tial ili kontraŭstaras ĉian ŝtaton kaj ĉian registaron, ĉar la socio, kiun ili defendas, sinbaziĝas sur la libero, la egaleco kaj la justo.

Sekve la principoj de la anarkiista propono estas: rekta demokratio, kolektiva proprieto sur la produkrimedoj, egalecemo kaj interhelpo.

**Rekta demokratio**: la gecivitanoj sin regu ilin mem demokrate. La abolo de la ŝtato ne sekvigas la malorganizon de la socio, sed tion, ke la organiza maŝinaro ne elglitu el la senpera kontrolo de la civitanaro kaj kreu regantan kaston kiel nuntempe. Tial la civitanaj asembleoj elektos **reprezentantojn**, ne registojn, kiuj agos laŭ la decidoj de la plejmulto kaj kiuj estos anstataŭigeblaj je ĉiu momento. La nuna formala demokratio estas nur kaŝita diktatorado.

**Kolektivismo**: la aŭtentika povo estas la ekonomia povo. Tial, ĉiu reala demokratio devas komenci per la ekonomia demokratio kaj tiu ĉi nur eblas, se la kapitalo kaj la produkrimedoj estas proprieto de la tuta socio.

**Egalecemo**: la rekta politika kaj ekonomia demokratio estas la nemalhavebla kondiĉo por finigi la ekspluatadon de la homo per la homo. Nur socio kun ĉiuj siaj membroj egalaj, kun samaj rajtoj kaj devigoj, kun samaj ŝancoj kaj kun sama decidkapablo povas esti justa socio.

**Interhelpo**: tiu liberecana socio estas atingebla, nur se oni anstataŭigas la nuntempan konkurencemon inter homoj, kolektivoj kaj landoj per la interhelpo kaj la solidareco, kreante internacian komunumon, en kiu ĉiuj membroj kunlaboru inter ili preter landlimoj, rasoj kaj kiu ajn diferenco.

Tiel la ĉefaj agitvortoj de la anarkiismo estis kaj estas: abolo de la ŝtato, abolo de la salajrata laboro kaj de la privata proprieto sur la produktrimedoj, forigo de la landlimoj kaj internacia solidareco.

* En venontaj numeroj ni demandos: ĉu la anarkiismo eblas aŭ ĝi estas alitempa utopio? ĉi ĝi estas bezona nuntempe? kiel oni povas antaŭeniri al liberecana socio?

# Ĉu formala demokratio

Estas rimarkinde —kaj zorgige— la fakto pri tio, ke nuntempe, kiam oni demandas al la loĝantoj de tiu ĉi lando pri la ĉefaj problemoj, neniam estas menciita la manko de demokratio. Estas tre danĝera afero, ke la civitanaro estas akceptinta sen eĉ unu sola plendo, ke tiu ĉi politika sistemo (la reprezenta aŭ parlamenta demokratio) estas la nursola ebla, "tiu malpli malbona", kiel kutime diras la politikistoj mem.

Sed ĉu ni rajtas reale paroli pri demokratio kiel "regado de la popolo"? Politika sistemo sinbaziĝinta sur hierarĥiaj (kontraŭdemokratiaj) strukturoj kiel la politikaj partioj, kiuj kidnapas dum kvar jaroj la voĉdonon cele interŝanĝi ĝin kvazaŭ bildokartojn, sen reala respondeco pri siaj agoj, flankenlasante la plejmulton de la civitanaro, kiu havas neniun ŝancon sin aŭdigi de la sistemo. Nun la demokratio estas reduktita al fasado por kaŝi (kaj protekti) la povon de la grandaj kapitaloj. La plejmulto el la ĉefaj politikaj partioj havas la saman programon, kiun priskribas la bankoj kaj la financaj spekulaciistoj, la entreprenoj kaj la tutmondaj institucioj (IMF, MKO, Monda Banko...)

Restas sunklare, ke la parlamenta demokratio reprezentas nek la popolon nek ties interesojn. Nepras anstataŭigi ĝin per la Rekta Demokratio (RD): la politika sistemo, per kiu la popolo realigas sian povon klare, sen reprezentantoj kaj pere de rektaj decid-metodoj.

Jean-Jacques Rousseau defendis ĝin. Iu el la argumentoj de lia verko *Pri la socia kontrakto* laŭtas: «La suvereneco ne estas reprezentebla, kaŭze de la sama kialo laŭ kiu ĝi ne estas vendebla; ĝi estas ĉefe ĝenerala volo —kaj la volon oni ne reprezentas: ĝi estas ia aŭ alia. La deputitoj de la popolo ne estas nek povas esti reprezentantoj, ili estas nursole komisaroj kaj finfine ili rajtas decidi nenion. Ĉiu leĝo, ne ratifita de la popolo mem estas senvalida; tio estas, ĝi ne estas leĝo.»

Ĉu ĝi estas realigebla sistemo? Nune estas spertoskizoj de RD ĉe landoj kiel Svislando, Usono, Italio, Urugvajo, Germanio ktp. Ĉe tiuj ĉi landoj, pere de subskribkolekto (financata de la registaro, ekzemple ĉe Germanio) je certa tempolimo, la civitanoj havas eblon proponi novajn leĝojn (inkluzive de konstituciaj modifoj) pere de referendumoj, sen bezono proceduri je la regionaj aŭ naciaj parlamentoj, modifi leĝojn, kiujn aprobis tiuj parlamentoj, eksigi elektitajn postenojn ktp.

Oni komparu tion kun la hispana situacio: la civitanoj rajtas fari leĝoproponojn al la Parlamento, subskribitaj de 500.000 homoj (65.000 en Katalunio), nur kondiĉe ke ili ne temu pri modifoj al "organikaj" leĝoj aŭ internaciaj aferoj. Je la malmultaj okazoj, kiam oni atingis plenumi tiujn kondiĉojn, estis aprobata leĝo tutkontraŭanta la popolan iniciaton, ekzemple la Leĝo pri Restaĵa Bruligo de la Kataluna Parlamento.

Ĉe pli proksima kampo, ĉe la municipoj, ni trovas la tiom faman kaj ekemplodonan okazon de Porto-Alegro (Brazilo), kie ekde la 1989a la municipaj budĝetoj estas difinitaj el la civitanara asembleo, kiu krome rajtas kontroli la ĝustan uzon de la publika mono.

Klasika argumento kontraŭ la RD sinbaziĝas sur tio, ke "la aferoj, pri kiuj devas decidi la registoj, estas tro kompleksaj por ke povas esti komprenataj de ĉiuj civitanoj". Se

# aŭ rekta demokratio?

ni akceptas tion kiel pravan, la civitanoj, ĉar ili ne taŭgas kompreni ilin, ne povas scii, ĉu la agoj faritaj de siaj reprezentantoj estas la ĝustaj, kio signifas, ke ili ne taŭgas taksi la decidojn, kiujn prenis iliajn reprezentantoj nek ilin mem, tiam kiel elekti niajn gvidantojn? Tiel analizite, ni povas vidi, ke tio ne temas pri argumento kontraŭ la RD, sed kontraŭ la demokratio mem, kio estas tre grava.

Sed al ni ne sufiĉas la kvazaŭpraktikoj de RD antaŭe klarigitaj. Ni deziras plu! Ni deziras entutan kaj realan rektan demokration. Ni deziras malmunti la maŝinaron de la povo dum oni konkeras ĉiam pli ampleksajn spacojn de aŭtonomio kaj partoprenema administrado.

La modelo de anarkiista rekta (aŭ konsenta) demokratio, kiel la anarkiismo entute, reprezentas vidon pri la socio, ĉefe fokuzita al ĝiaj mikrokampoj. La zorgo estas ne je la rilato inter registaro kaj regitoj, sed nursole inter la regitoj, kiuj sin liberigas el la registaro. La ideo estas tio, ke la homoj unuiĝu je la plej bazaj kampoj —sendepende kaj auxtonome— kaj per kunlaboro kun siaj kuncivitanoj prenu decidojn, kiuj tuŝu iliajn propajn bezonojn kaj ne tiujn de la gvidantoj, kiuj regas aŭ deziras regi ilin. Tiuj ĉi decidoj estas senvalidigeblaj ĉiumomente.

Ĉi-tuta proceso sin baziĝas sur la principo pri asemblea konsento, ĉar la anarkiista RD ne estas ligita kun la koncepto pri regado de la plejmulto. Aldone ĉiuj homoj, damaĝitaj de interkonsento, havus rajton pri vetoo je tiu ĉi decidprena proceso. Tio ebligas ilin senvalidigi la decidon kaj tiel rekomenci la debaton.

Ideale estas konsento aŭ unuvoĉa akcepto kaj aliĝo al decido aŭ al vidpunkto pri la decido. Tiu ĉi estas la modelo de la konsenta demokratio.

Por ektrakti problemojn, kiuj surpasas la limojn de la urbo, la demokratigitaj municipoj de iu regiono konsistigus konfederacion kaj sendus delegitojn al konfederacia konsilio. Tiu ĉi konfederacio estus neniu ŝtato, ĉar ĝi estus plene regita de la civitanaraj asembleoj. La senditaj delegitoj havus povon nur trakti decidojn, kiujn prenis ilia asembleo kaj restos subigitaj al ĝi. La perantaj komitatoj inter urboj aŭ inter kvartaloj ĉe urbegoj havus nenian kapablon preni decidojn; ili estas debataj komitatoj aŭ rondoj, en kiuj ĉiu koncerna homo rajtas arigi kaj partopreni la debaton. La fina celo estas trovi proponojn akcepteblaj de ĉiuj la koncernitoj kaj reiri al la bazgrupoj kun tiuj ĉi proponoj. Tio ebligus la interregionan kooperadon.

Menvide tiu ĉi RDa proceso postulas altan nivelon de engaĝiĝo kaj konscienciĝo flanke de la partoprenantaj homoj. Repensigon pri ni mem kiel individuoj ne kiel marionetoj de la sistemo, kun la fina celo superfluigi la ŝtaton, neniigi la nunajn politikajn kaj ekonomiajn elitojn.

Ĉu utopio? Eble, sed la historio montras fojon post fojo, ke eblas ŝanĝi ĝian kurson. Kaj je la nunaj momentoj, kiam ne nur mankas demokration, sed kiam krome la povo montras sian aŭtentikan visaĝon kiel detruanton de la planedo Tero, pli ol neniam nepras la rekta interveno de la popolo.

# La “Ruĝa”

Tiu ĉi skribaĵo originas el vizito al mia familio je Kastilia vilaĝo. Tie altiris mian atenton la kvanto el ruĝ-flavaj flagoj, ornamantaj la placon. Mi komentis al miaj familianoj, ke por iu, venanta el Katalunio, tio estas atentotira fakto, ĉar estas ia socia antaŭjuĝo (aliflanke sufiĉe pravigita) kontraŭ la standardo. La hazardo deziris, ke miaj familianoj redonis viziton al mi dum la futbala mondĉampionado kaj la apoteozo de “La Ruĝa”. Logike, kiam ili vidis multegajn balkonojn ornamitajn per la hispana flago, ili surprizis kaŭze de nia konversacio antaŭ du monatoj. Mi ĵuris kaj ĵuradis, ke tiu fenomeno estis io tute nova por mi, ke mi neniam vidis tiom da hispanaj flagoj kunigitaj, sed reale mi ne povis nei la evidenton. Krome, se al la afero de la flag-milito kaj “La Ruĝa” ni aldonas la polemikon pri la malpermeso al la taŭrbataloj, la aŭtonomecan statuton kaj la parolan perfortecon de iuj amaskomunikiloj, ni trovas komencon de dupolarizo de la kataluna socio, kiu restas disigita de la hispana kaj kataluna naciismoj. Tiu ĉi streĉo, tiu ĉi malsereno montriĝas pli elstare ĉe tiuj, kiuj, kiel tiu verkanta, vivas baskule inter du mondoj: tiu oficiala aŭ kataluna kaj tiu patrin-familia aŭ hispana. Ĉe tiu ĉi malsimpla situacio mi kutime troviĝis defendante opiniojn, kiuj kontraŭstaris la laŭvice interparolanton, tio estas, antaŭ la kataluna naciisto mi defendis la miksiĝon kun tio hispana, antaŭ la hispana naciisto mi klopodis trudi la “katalunan prudenton”. Ĉe neniu el la du okazoj mi sentis esti plene mi mem. Mi eraris enirante tiujn sensencajn patriotajn batalojn anstataŭ kontraŭbatali ilin per la plej bona kuracilo kontraŭ flagoj kaj patrioj: la liberecana propono, mia propra ideologio, la **anarkiismo**.

Rigardi tiun ĉi sensencan diskuton el strikte liberecana vidpunkto kunportis unue grandan spiritotrankvilecon, ideologian nirvanon, kie klariĝis definitive ĉiuj konceptoj kaj ili donis al mi klarvidadon. Rigardite per tiuj novaj okuloj la debato malpleniĝis, la naciista manipulado evidentiĝis kaj la diversaj defendataj posicioj fariĝis supraĵaj. Mia maksimo, mia viva principo realĝustiĝis rimede de ĉiuj ŝablonoj, kiuj estas nenio krom sintezo el unu ideo: mi estas antaŭ ĉio **civitano el la mondo**, miaj fratoj ne estas la prezidanto de *La Caixa* aŭ de la *Banco de Santander*. Mi havas nenion komunan kun ili krom la etikedon pri hispano aŭ kataluno. Miaj interesoj, miaj problemoj, miaj spertaĵoj estas pli proksimaj al tiuj de kiu ajn laboristo el Valadolido, Barcelono aŭ Ĉinio ol al tiuj de la patrioto Joan Laporta. La **patrioj estas artefaritaj dividoj** de unu sola tero, kiuj frakciigas artefarite la socion kaj favoras la preteratenton, la forgeson de la sola divido ĉeestanta laŭlonge de la historio: tio estas, tiu inter riĉuloj kaj malriĉuloj, tiu inter povo kaj regato. Ni memoru pri tio, ke la patrioj aŭ nacioj estas modernaj konceptoj, kiuj aperas ne antaŭ ol la 19a jarcento, post kiam la burĝaro akiris la politikan povon kaj ili estas uzitaj kiel adheriloj, post kiam la religio kaj la eklezio perdis sian narkotikan efekton. **La flagoj estas nenio krom farbigitaj ĉifonoj**, por kiuj la homoj pretas morti, tamen tiuj kutime estas ĉiam la samaj: la loĝantoj de la plej malaltaj sociaj ebenoj, kiuj estas uzitaj kiel kanonfuraĝo de tiuj, kiuj, ŝirmitaj per la patrio kaj la flago, kaŝas interesojn pli materiajn kaj mondumajn. La **naciismo** laŭesence, ĉu kataluna aŭ hispana, **estas konservisma**. La naciisto estas feroca sekvanto de la tradicioj kaj kutimoj de la loko, kie li naskiĝis, malgraŭ kiom da retroiraj ili povas ŝajni kaj sia celo estas nur havi nacion kun propra ŝtato kaj ne veran transformiĝon de la socio suvoje al la libero kaj la justo. La socia liberigo restas ĉe dua ebeno kaj praktike signifas nursole la anstataŭigon de iun burĝaron per alia.

Ĉio entute validis al mi kiel atentilo por defendi per mia tuta fiereco, libera el kiu ajn antaŭjuĝo, ideojn tiel ŝajne simplaj kiel tiuj de la anarkiismo rilate al la naciaj aferoj. Definitive tiu nia estas la tria vojo, tiu de la internaciismo, tiu, kiu metas la homon super flagoj, kredoj aŭ farboj.

JAFL